

Termine 2016/2017 mittwochs 19.00-21.00 Uhr

Sumpflume Hameln

2016: 14. Sep., 28. Sep., 28. Sep., 12. Okt., 26. Okt., 9. Nov., 23. Nov., 30. Nov., 9. Dez. Weihnachtsfeier im Pfannekuchen; 14. Dez., Weih.pause,
2017: 11. Jan., 25. Jan., 8. Feb., 22. Feb., 8. Mrz., 22. Mrz., 29. Mrz., 12. Apr., 26. Apr., 10. Mai, 24. Mai, 31. Mai, 14. Jun., Sommerpause, 9. Aug., 23. Aug., 30. Aug., 13. Sep., 27. Sep., 11. Okt., 25. Okt., 8. Nov., 22. Nov., 29. Nov., 13. Dez., Weihnachtspause,
Das aktuelle Programm unter: www.esperanto.de/hameln


Invito al la

13-a “Rata★Rendevuo” en Minden sabaton, la 15-an de oktobro

La „Ratkaptista Bando“ invitas vin al Minden. Ni esperas, ke ni povos ĝui belan tagon kun multaj Esperanto-amikoj. Nia telefono por la aliĝo kaj demandoj: **0162/7536396.**

La programo:

- ekde la 9-a 30: Renkontiĝo kun frualvenantoj en la kafejo „**Extrablatt Minden**“, Markt 9, por trinki kafon kaj babili, matenmanĝo eblas <https://cafe-extrablatt.de/standorte/details/cafe-extrablatt-minden>
- 11-a ĝis 12-a 30: **Historia urba ĉiĉeronado** al la elstaraj vidindaĵoj de Minden, kiel la 1000-jara **katedralo**, kelkaj imponaj konstruaĵoj el la prusa tempo kaj la **urba domo** kun la plej malnova gotika urbdoma loĝio; ekiro antaŭ la kafejo Extrablatt;
- poste ĉ. 12-a 40: **Tagmanĝo** en la **Restoracio „La Scala“**, Markt 6, bonvolu antaŭmendi la tagmanĝon (rigardu la antaŭelekton sube) <http://lascalaporta-net.de/>
- ĉ. 14-a 30: Veturado per aŭtoj al la **Ŝakta kluzo**, kunvetureblecoj ekzistas



- 15-a ĝis 16-a 45: **Ŝiprondveturado sur la rivero Vezer kaj la Mezlanda kanalo kun kluzadoj tra la Ŝakta kluzo**; dum la veturado ni konatiĝas kun la vidindaĵoj ĉirkaŭ la plej granda duobla akvovojo kruciĝo de la mondo, ni veturas al la historia fiŝista urbo kaj laŭlonge de la Vezera promenadvojo, kie ankras la Minden-a Ŝipmuelejo, kaj ni veturas al parto de la Minden-aj kanalhavenoj

- poste ĉ. 17-a: Kaftrinkado laŭ interkonsento surloke, ekz. en la **Bistro an der Schachtschleuse** aŭ en iu glaciaĵejo en la urbocentro;

- fino ĉ. 17-a 30/18-a horo

Kostoj: Historia urba ĉiĉeronado kaj ŝiprondveturado: **11,00 €**;

manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (kafejo, restoracio, bistroo) ĉiu mem pagas;

Aliĝo kaj ĝirado de la kotizo bonvole nepre **ĝis la 8-a de oktobro**: hameln@esperanto.de, telefono: **0162**

7536396, Doodle-listo: [http://doodle.com/poll/](http://doodle.com/poll/m69e7uyuu9qfbegt)

[m69e7uyuu9qfbegt](http://doodle.com/poll/m69e7uyuu9qfbegt)

Bonvolu **ĝiri** la kotizon de **11,00 €** por la ĉiĉeronado kaj ŝipveturado **ĝis la 8-a de oktobro 2016** al la konto de la Esperanto-Gruppe Hameln ĉe la Sparkasse Hameln-Weserbergland

IBAN: DE87 2545 0110 0160 1186 18

BIC: NOLADE21SWB

Senkosta parkejo por aŭtoj: Kanzlers Weide, Uferstraße; piede super la Vezera ponto (Kaiserstraße), de Klausenwall iru en la Vinckestraße, tra la Kleinen Domhof al la Markt; aŭ super la ponton por piedirantoj (Glacisbrücke)

kaj poste daŭrigu tra la Tonhallenstraße al la Markt; ĉ. 1 km, 13-15 min.; vojo de la stacidomo al la urbocentro: 1,6 km, ĉ. 20 min.: de la stacidomo iru dekstren al la Viktoriastraße, Kaiserstraße super la Vezeran ponton, Klausenwall, Vinckestraße, Kleiner Domhof, Markt. Parkejoj en la urbocentro estas pagendaj.

Bonvolu menci, se vi deziras lokon en aŭto por la veturado de la urba centro al la Ŝakta kluzo kaj reen (ĉ. 2,5 km)

XX

Mi partoprenas je:

O kafejo | O Historia urba ĉiĉeronado | O Tagmanĝo | O Ŝiprondveturado | O Bistroy

Mi antaŭmendas jenan tagmanĝon: http://lascala.porta-net.de/lascala_speisekarte.pdf

O Nr. 25 Risotto Impero Romano (rizo kun artiŝokoj, Parmaŝinko, bubala mozarelo, aromigita per trufoj, flamigita per konjako en fromaĝa kremajo) 16,50 €

O Nr. 30 Lasagne alla Bolognese (Nudela gratenaĵo kun vianda saŭco) 10,20 €

O Nr. 32 Cannelloni di Ricotta e Spinaci (Nudelaj rulaĵoj gratenitaj kun fromaĝo, vegetara) 10,50 €

O Nr. 69 Bistecca alla Griglia (Rumsteko de rostkrado kun salato kaj pano) 18,90 €

O Nr. 81 Pizza Margherita (Tomatoj, mozarelo, vegetara) 6,90 €

O Nr. 85 Pizza Parma (Tomatoj, mozarelo, Parmaŝinko) 9,90 €

O Nr. 89 Pizza al Salmone (Tomatoj, mozarelo, salmo, kraboj) 9,90 €

O Nr. 93 Insalata Tonnarello (miksita salato kun kradrostita tinusa fileo, rukolo, parmesano) 16,90 €

O Nr. 94 Insalata Mista (verda salato kun tomatoj, kukumoj, cepoj, vegetara) 7,30 €



O Mi bezonas kunvetureblecon en aŭto de la urba centro al la Ŝakta kluzo kaj reen
O Mi povas kunpreni personojn en mia aŭto (al la Ŝakta kluzo kaj reen al la centro)
Bonvenon en Minden!

RAYMOND SCHWARTZ
KIEL AKVO DE L' RIVERO



Edistudio

LIBRORECENZO: KIEL AKVO DE L' RIVERO

Mi legis la libron de Raymond Schwartz: Kiel akvo de l' rivero. Ĝi tre plaĉis al mi. Vere rekomendinda libro ĝi estas. Kaj je la fino de la libro mi tute ne plu povis ĉesi la legadon, ĉar ĝi estis tiom ekscitita kaj ĉiam aperis novaj ŝanĝoj en la vivoj:

Pierre, juna franco el Loreno, pasigis unu eksterlandan jaron en Berlino kaj tie en gastfamilio kaj sia ĉirkaŭaĵo trovas multajn novajn geamikojn, enamiĝas en berlina knabino, sed tiam, la mornaj antaŭsignoj de la 1-a mondmilito alproksimiĝas kaj li devas fuĝi. Ĉu li revidos Annemarie iam ajn? Estas tre impresoj, kiel la aŭtoro lumigas la diversajn flankojn: geedziĝfesto en Loreno, studenta vivo en Parizo kaj aliflanke en Berlino, la disvolviĝo de la milito, kiel estas la vidpunkto de la germanoj, kiel de la francoj? Pierre povas

kompreni ambaŭ flankojn. Sed montriĝas, ke la historiaj okazaĵoj multege influas la individuon, neniu povas eliriĝi el ili. La tempo kaj la historio kunprenas nin - kiel akvo de l' rivero.

Nur sur paĝo 341 (486 ampleksas la libro entute) la onklo de Pierre en konversacio mencias la titolon de la libro - jen eltiraĵo:

“Kio ni estas entute? Nur guteto da akvo en granda rivero. Neniu povas iri kontraŭ la

fluado. Ni estas kuntirataj. Fojfoje okazas, ke iuj gutoj, ĉe borde, malpli kunpuŝataj ol tiuj meze de l' rivero, kroĉiĝas al iu vegetaĵo aŭ sukcesas enflueti en flankan golfeton; kelkfoje pasanta boato remilŝprucigas gutojn sur kanospikojn aŭ ĉebordajn salike-tojn. Tiam tiuj gutoj ĝuas la iluzion de sendependeco. Nur mallonge. Kia estos ilia sorto? Ili disvaporigas. Ogre soifa suno ensorbis ilin. Postrestas nenio. Tio estas la komuna destino de l' homaro. Ni estas kaptitoj de nia ĉirkaŭaĵo, ne nur korpe, sed ankaŭ, kaj ĉefe, mense. Kiel akvo de l' rivero.” Ankaŭ mi havas la privilegion vivi en vilaĝo apud rivero - la Vezero (Weser). Sidante ĉe ĝi kaj rigardante al ĝi, oni ne nur vidas la akvon fluantan, sed same ankaŭ la fluantan vivon. Ĝuu la legadon de tiu ĉi bonega libro. (Heinz)

Ludo

Kálmán Kalocsay

Ho ludo, dolĉa ludo, vi saĝo de sensenco,
oaz' de freŝaj fontoj, malgranda paradizo,
loganta el dezerto de nia vivogrizo,
Por ĉiuj vivozorgoj plej rara rekompenco!

Nobliĝas per vi proza krudeco de l' esenco
de l' tera amo; kovras, per sorĉa improvizo,
ĉion kulisoj feaj kun brilo kaj irizo,
patrino de Scivolo, de Arto, de Scienco.

Ho, se ni fine lernus ekludi jam sen masko!
Ne plu posedavide, glavtinte, trompe, turpe,
ne kun ponard' kaŝita perfide sub la basko,
sed gaje kaj sincere, sencele kaj senkulpe,
kiel la bunta brilo de plumoj de kolibrojoj,
aŭ kiel sur kristalo irizaj lumovibroj.

el *Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981*

Prelego kaj vizito de Jacques Sans el Ĝenevo



Foto-Kaleidoskopo



93-a Germana Esperanto-Kongreso en Munkeno





Studsemajnfino en Buurse, Nederlando



Vizito en Bruselo



Universala Kongreso en Nitra



Ĝardena festo ĉe Waltraut kaj Klaus

VORTLUDOJ (el Vikipedio) <http://www.autodidactproject.org/bib/esperanto-ludoj.html>

Anagramo estas vorto(j) farita(j) de alia(j) vorto(j) per reordigo de ties literoj:

ido > do i > dio > odi

esperanto > personate > per sateno > persa etno > Nero petas > se ne patro > repo en S.A.T. > sapo teren > a-serpento ktp.

Palindromo estas vorto aŭ frazo kiu sencohave legeblas ambaŭdirekte (aŭ, pli precize, ambaŭsence).

Ekzistas du tipoj de palindromo:

1. Unusignifa palindromo: *oro / Saĝa nomo naĝas. / Ne mateno, bone tamen. La vedo celas: ne malsatas lam' en saleco de val'.*

Disignifa palindromo: *aroma* (amora) / *apud Olga* (aglo dupa)

Plej multaj aŭtoroj kaj vortaroj rigardas valida nur la unuan tipon. Tial normale per 'palindromo' oni komprenas tiun, kiu havas la saman signifon se oni legas ĝin en ambaŭ (direkto)sencoj.

Por multaj homoj estas defio krei la laŭeble plej longajn palindromojn.

Vortoj: *ala, jaraj, mem, naŭan, nin, nomon, nun, oro*

Frazoj:

Ne bruu ribele, nun el eb' iru urben. (eb' estas mallongigo de ebena)

Memoru ne matene juĝi, ne cediĝi. Raru bele, ine. Neni el ebura rigidec' eniĝu.

Jen eta menuro mem.

Ora trovo: vortaro.

Nu, nur bele celebru nun.

Amis korpo proksima.

Ĉiuliteraĵo estas frazo entenanta ĉiujn literojn de la skribsistemo de la lingvo uzata, aŭ almenaŭ ĉiujn literojn de ĝia kutima aboco, ekzemple:

45-litera *Aĥ! Kaŝiĝu vi hejme! Apenaŭ uzeblas ĉi fieca langtordaĵ'.*

Por multaj homoj estas defio konstrui kiel eble plej mallongajn ĉiuliteraĵojn por diversaj lingvoj. Oni distingas inter *minimumaj* kaj *neminimumaj* ĉiuliteraĵoj. *Minimuma* oni nomas ĉiuliteraĵon, en kiu ĉiu litero aperas ekzakte unu fojon.

En la 20-a jarcento oni ofte uzis ĉiuliteraĵojn por testi telegramilojn kaj skribmaŝinojn.

Nuntempe tiaj frazoj ĉefe havas funkcion kiel hazarda pleniga teksto en kelkaj programoj, aŭ kiel demonstrilo de tiparoj. En komputiloj, por scii ĉu la ĉapelitaj literoj de Esperanto bone funkcias, oni kutime uzas la «ĉiŭĉapelaĵon» *eĥoŝanĝo ĉiŭjaŭde*.

32-litera *He, Miĥĉj', ĵaŭdgrafluzpec' vektŝanĝos!*

37-litera *Laŭtgorĝa ĉeĥ' poŝbaze havas kaŝmucidajojn.*

38-litera *Gajecvoĉa fuŝmuĝaĵo de knabĥoro haltpaŭzis.*

39-litera *Ĉu kvazaŭdeca fuŝhoroĵo ĝojigeblas homtipon?*

41-litera *Eble ĉiu kvazaŭ-deca fuŝhoroĵo ĝojigos homtipon?*

43-litera *Laŭ poŝtaĵoj, eĥis baseca voĉo de Zamenhof kuraĝige.*

45-litera *Ĉi-ĵaŭde ŝi havigu informojn pri biciklista ĝazo-ĥoro.*

47-litera *Kuba harpisto ŝajnis amuziĝi facilege ĉe via ĵaŭda ĥoro.*

49-litera *Hamake ĉi-ĵaŭdvespere, eĥata bonfik' plezurece ĝojigos ŝin.*

50-litera *Deca paroĥo havebligas ŝinkon. Almozatoj furaĝas ĉiŭjaŭde.*

52-litera *Ŝajnas ke sagaca monaĥo laŭtvoĉe rifuzadis preĝi sur herbaĵo.*

53-litera *Laŭ Ludoviko Zamenhof bongustas freŝa ĉeĥa manĝaĵo kun spicoj.*

53-litera *Hekatom baj basŝafoj, ĝue zorgu pri viaj ĉiŭjaŭdaj ĥorlecionoj!*

53-litera *Ho ve, ĵus nia ĥorestro preskaŭ ŝokiĝis ĉe l' fiecaj zumadbruegoj*

Esperanto-Veranstaltungskalender:

siehe auch: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

2016: **10.9.** Tag der Kulturen in Lauenstein; **16.-19.9.** BeNeLuksa Kongreso en Lier apud Antverpeno, BE; **23.-25.9.** 32a ARKONES en Poznań, PL; **30.9.-3.10.** 16a KoKoLoRES (Spieletreffen) in Schwerte; **30.9.-3.10.** TORPEDo 11 in Herzberg am Harz; **30.9.-14.10.** Minibusvojaĝo tra Irano; **1.-3.10.** Kurswochenende in Sundern; **3.-9.10.** Sprachseminar in Mnichovo Hradiště, CZ; **7.-9.10.** 40aj Jubileaj Preĝtagoj en Częstochowa, PL; **7.-9.10.** 10a BIERO en Turnov, CZ; **7.-9.10.** 1a Internacia Junulara Renkontiĝo en Islamabad, PK; **8.-10.10.** 103a Japana Esp.-Kongreso en Oumihaci-man, JP; **9.-14.10.** 6a Esperantista Migrado Aŭtuna en Waldfischbach-Burgalben; **13.-16.10.** 16a Kongreso de Ĉeĥa Esp.-Asocio en Pelhřimov, CZ; **15.10.** 13a Rata Rendevuo en Minden; **21.-23.10.** 70a Jubilea Kultura Semajnfino en Homburg/Saar; **21.-23.10.** Esp.-Wochenende von Esperanto Hamburg mit Bertilo Wennergren in Muess bei Schwerin; **22.-29.10.** Kieva Esp.-Semajno, UA; **24.-28.10.** Pedagogia staĝo kun Katalin Kováts en Bouresse, FR; **24.10.-1.11.** 5a AŬTUNE kun Dennis Keefe en kastelo Grezjilono, FR; **28.-30.10.** **Verbandsratstreffen in Herzberg am Harz;** **28.-30.10.** KKPS Klač-Kunveno Post-Somera en Delft, NL; **29.10.-1.11.** 20a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Antequera, ES; **3.-6.11.** 8a Azia Kongreso en Quanzhou-urbo, CN; **4.-6.11.** BAVELO-Seminar in Rastatt; **11.-13.11.** Esperantista renkontiĝo Gruppe 19 en Gliwice, PL; **11.-13.11.** Junulara Aŭtuna Semajnfino en Bath, GB; **6.-23.11.** Ekskurso de Mongolio al Interna Mongolio, sur la spuroj de Ĉingis-hano, MN; **17.-20.11.** KAEST Konferenco en Modra-Harmónia, SK; **19.-20.11.** 28a Eŭropa Rendevuo de Stella en Stella Plage, FR; **25.-27.11.** 22a Kongreso de UkrEA en Kievo, UA; **3.12.** Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio en Stolpen; **9.-11.12.** **76a Studsesio en Herzberg am Harz kun Zamenhoffesto (10.12.);** **9.-11.12.** Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bialistok, PL; **17.-18.12.** 4a Granda lokŝumado en Bratislavo, SK; **24.-31.12.** 6a Afrika Kongreso de Esperanto AKE en Serengeti, Bunda, TZ; **27.12.-3.1.** **15a NR Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken;** **28-a-4.1.** JES Junulara Esperanto-Semajno en Waldheim am Brahmsee, norda Germanio; **28.12.-4.2.** Luminesk' en Kleve;

2017: **5.-8.1.** 35-a Poludnica en Malaltaj Tatroj, SK; **6.-15.1.** Kongreso kaj somerkursaro en Brisbano, AU; **11.-18.2.** 24a E-Korusa Semajno ĉe Pireneoj en La Bastide-sur-l'Hers, FR; **24.-26.2.** **77a Studsesio kun kurso por Unua Helpo en Herzberg am Harz;** **26.2.-8.3.** 12a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Kathmanduo, NP; **4.-11.3.** Mediteranea Esp.-Semajno en Les Issambres, FR; **14.-19.3.** Kuba Esp.-Renkontiĝo en Vinjalo, CU; **17.-19.3.** **Esp.-Wochenendkurs in Herzberg am Harz;** **31.3.-3.4.** 10a Mezorianta Esp.-Kunveno en Tbliso, GE; **28.4.-2.5.** Mirinda Lviv en Lvovo, UA; **29.4.-1.5.** **78a Studsesio pri Zamenhof en Herzberg am Harz;** **18.-22.5.** Interkultura Majrendevuo en Vroclavo, PL; **18.-28.5.** Esplorvojaĝo laŭ spuroj de antikvaj hunoj en Ulanbatoro, MN; **20.-21.5.** Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Vroclavo, PL; **24.-28.5.** **BARO en Bad Münden;** **25.-28.5.** AMO LIMA por instruistoj en Les Brenets, CH; **2.-5.6.** **94a GEK Germana Esp.-Kongreso en Freiburg;** **16.-18.6.** **79a Studsesio en Herzberg am Harz;** **4.-13.7.** NASK La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esp. En Raleigh, US; **19.-29.7.** Piedmarŝo Milan Zvara en Karpata montaro, UA; **22.-29.7.** **102-a UK Universala Kongreso de Esp. en Seulo, KR;** **22.-30.7.** SEFT Somera Tendaro en Thomsdorf; **29.7.-6.8.** Haltejo Woodstock en Kostrzyn ĉe la rivero Oder/Odra, PL; **31.7.-5.8.** 9a Esp.-boatado sur la rivero Kupa, HR; **5.-12.8.** IJK Internacia Junulara Kongreso en Aneho, Togolando; **6.-12.8.** 1a INTER-FEST kultura festivalo en Bjelovar, HR; **29.9.-3.10.** **17a KoKoLoRES en Schwerte;**



Prelego kaj vizito de Adjévi Adje el Togolando



Vizito ĉe la Esperanto-grupo en Hildesheim